

Persekutoj kontraŭ la Internacia Lingvo en Soveta Unio,
laŭ la historiaj studoj de Ulrich Lins, 4-a parto
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 606, 1975.05.21 & 24

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Nin bazante sur la historiaj priskriboj de Ulrich Lins ni hodiaŭ prezentas al vi raporteton pri la persekutoj kontraŭ la esperanto-movado okazintaj en la orient-eŭropaj ŝtatoj sub la stalina regado.

A.- Ni jam raportis pri la persekutoj en Sovetio, kiuj kaŭzis la deportadon en Siberion de tre verŝajne pli ol 15'000 esperantistoj. Estas normale, ke posta persekuto ankaŭ karakterizis la orient-eŭropajn ŝtatojn, kiujn Sovetio liberigis el la faŝisma jugo. Tuj post tiu liberigo esperanto-organizaĵoj restariĝis, sed tiu portempa aktiveco devis baldaŭ ĉesi laŭ ordonoj venintaj el Moskvo.

Cl.- Kiam la 2-an de oktobro 1949 sinjoro L. Kőkény kiel kutime iris al la studio de Radio Budapeŝto, oni tiam sciigis al li, ke ek « *de hodiaŭ estas la linio* » ne plu dissendi esperantajn elsendojn. Per tio komenciĝis la Granda Silento en Hungario. Tute same subite ankaŭ en oktobro 1949 mutiĝis la esperanto-elsendoj en Pollando.

A.- La stalinismo ne plu povis akcepti la mondlingvan celadon de Esperanto. En novembro 1949 la akademiano Jakovlev klarigis, ke la rusa lingvo « *ne estas nur la lingvo de USSR, sed ankaŭ la internacia lingvo en la popolaj demokratioj.* »

Cl.- La soveta zono de Germanio entreprenis la unuajn paŝojn por malhelpi reorganizigon de la esperanto-movado. La malpermeso venis en formo de dekreto de la administracio pri Internaj Aferoj, tio jam la 12-an de januaro 1949. La artikoloj 7 kaj 8 ordonis malfondon de la esperanto-organizaĵoj kaj tujan ĉesigon de la esperanto-rubrikoj en la gazetaro. La situacio ne ŝanĝiĝis per la fondo de Germana Demokratia Respubliko. Male la nova registaro precizigis en letero de la 4-a de novembro 1949 al Unuiĝo de Persekutitoj de la Nazia Reĝimo, ke : « *Estas fakto, ke kontraŭloj de nia demokratio provas ĝeni niajn laborojn per helpo de esperanto-grupoj. Per gazetoj aperantaj eksterlande kaj per tiel nomata internacia societo kun sidejo en München oni provas sub preteksto de kultura neceso gajni anojn, per kies helpo oni volas malbonfamigi nian demokratian ordon.* »

A.- En Pollando, kie ĉefministro Cyrankiewicz estis subskribinta peticion al UN favore al Esperanto, la atmosfero ankaŭ subite malboniĝis en 1949. Ni jam menciis la ĉesigon de la esperanto-elsendoj de Radio-Varsovio. La 4-a postmilita Pola Esperanto-Kongreso okazonta en aŭtuno 1949 en Varsovio lastmomente ne povis okazi, kaj la jam kompostita numero de *Pola Esperantisto* ne povis aperi. Kvankam la organizaĵo Asocio de Esperantistoj en Pollando neniam estis formale malpermesita, tamen ĉiam pli estis limigita ĝia agado. El 30 filioj restis nur 2, kiuj kune kun kelkaj individuoj grupiĝis ĉirkaŭ la Ĉefa Estraro. Multobligitaj informiloj povis aperi, sed eĉ presigi pagitajn anoncetojn por koresponda kurso ne estis eble.

Cl.- En Hnagrio, kie okazis sama persekuto ekde aŭtuno 1949, ankoraŭ en printempo 1948 pli ol cent parlamentanoj subtenis kampanjon por pli vasta instruado de Esperanto en la lernejoj. Du jarojn poste neniu esperanta gazeto plu aperis. *Literatura Mondo* ĉesis ekzisti post sia julia/aŭgusta numero en 1949, oficiale « *pro financaj malhelpoj* ». Kaj la 6-an de aprilo 1950

komitat-kunsido de Hungarlanda Esperanto-Societo voĉdonis, ke « *la Esperanto-Societo provizore interrompu sian agadon.* »

A.- Plej vigle rezistis subpremon la ĉeĥoslovakoj. La organizaĵo Esperanto-Asocio en Ĉeĥoslovaka Respubliko havis komence de 1949 3'020 membrojn. Ĝia prezidanto Malik partoprenis la Universalan Kongreson en Bournemouth en somero 1949 kiel oficiala delegito de la Ministerio de Informado, kiam bulgarioj, hungaroj kaj rumanoj jam ne plu estis reprezentitaj. Ankoraŭ en majo 1950 aŭtoritatuloj salutis la 8-an Kongreson de Esperanto-Asocio de Ĉeĥoslovaka Respubliko. Tiun kongreson vizitis preskaŭ mil partoprenantoj. Kaj la nombro de la lokaj grupoj daŭre kreskis, de ĉirkaŭ 80 en 1949 al 94 en 1950. Sed en la lastaj monatoj de 1950 multiĝis la malfacilaĵoj ankaŭ por la ĉeĥoslovakaj esperantistoj. Dum la Universala Kongreso en Parizo en somero 1950 mankis ĉeĥoslovaka delegacio. La populara Verda Stacio ĉesis siajn esperantajn elsendojn meze de septembro kaj fine de la jaro 1950 Esperanto-Asocio de Ĉeĥoslovaka Respubliko sentis sin devigita ekzigi el UEA, kiu estas (ni citas : « *tro videble influata de reakcia politiko imperiista kaj de Tito-ismo.* » En 1951 la artikoloj de la Gazetara Servo de Esperanto-Asocio de Ĉeĥoslovaka Respubliko ne estis presitaj kaj okazis malpermesoj vendi lernolibrojn. En decembro ĉesis aperi la organo de Esperanto-Asocio de Ĉeĥoslovaka Respubliko pro decido de la Ministerio de Informado kaj fine je la 6-a de septembro 1952, laŭ konsilo de la Ministerio de Internaj Aferoj Esperanto-Asocio en Ĉeĥoslovaka Respubliko likvidiĝis « *libevole* » per decido de la Asocia Komitato.

Cl.- Tamen en Ĉeĥoslovakio la poresperanta aktiveco neniam ĉesis. Agema junularo en la regiono Ostrava regule organizis somerajn tendarojn por junaj esperantistoj. La revuo *El Popola Ĉinio* ĝis ĝia malpermeso en 1953 eniri Ĉeĥoslovakion havis pli ol mil abonantojn en tiu ŝtato. Tiam la stencilita bulteno *La Pacdefendanto*, kiun lanĉis Rudolf Burda en Plzen varbis al si tiun legantaron.

A.- La venontan semajnon ni raportos pri la reviviĝo de la esperanto-movado en la komunismaj landoj.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !

Kopirajto © Claude GACOND, www.esperanto-gacond.ch
Prilaboris: [Stefano KELLER](#), julio 2012